

Jaro I.

1. VII. 1925.

№ 2.



HOMECO

DUONMONATA INTERNACIA LITERA-
TURA ESPERANTO-REVUO.




Redaktejo ĉe
Pastro Georgi Hristov,
Popovo, Bulgarujo, Eŭropo.



Presejo „Prosveta“, POPOVO — Bulgarujo, Eŭropo.

Malgraŭ nia atento, ni allasis kontraŭvole en la prezentata n-o la jenajn pres- kaj aliajn erarojn:

Pago	Linio		Presita	Korektita
17	4	supren	aliu	alia
„	13	„	Unu granda	Granda
„	14	„	Unu Esperanto-	Esperanto-
18	5	malsupren	alie	aliloke
„	10	„	Esperanton	Esperanto
„	12	„	Aliel	Alikaŭze
19	15	supren	aktualajn malbonaĵojn	aktualaj malbonaĵoj
20	19	„	unu samideano unu	samideano
„	17	„	aliu	alia
„	6	„	unu nedisku-	nedisku-
„	1	„	aliu	alia“.
21	9	malsupren	Alie	Aliloke
„	2	supren	de	el
„	4	„	por	por ke
„	9	„	por	por ke
22	2	„	montri	montri elĉerpe
„	12	„	dum	dume
„	14	„	multesilaba	multsilabaj
„	15	„	ĉina kaj aliaj lingvoj	kaj ĉina lingvoj, la vortoj de
„	19	„	La samo	Same
24	18	malsupren	suferojn	suferoj
25	2	supren	de	de la
„	11	„	por ke	por
24	23		La versaĵo estas el la bulgara lingvo.	



HOMEKO,

DUONMONATA INTERNACIA LITERATURA ESPERANTO-REVUO.

En Bulgario 5 numeroj kostas 20 levojn. Eksterlande
5 numeroj kostas 25 levojn = 1 svisa franko = 3.50
francaj frankoj = 0.05 liroj-sterlingoj = 0.20 dolaroj.

Akceptata plej malgranda abonpago pri 5 numeroj.

Redaktoro:

Pastro Georgi Hristov, Popovo, Bulgario, Eŭropo.

Estimataj samideanoj!

Mi ne povis plenumi mian promeson aperigi la revuon la 15. junio j. k. La kaŭzo estas la grandegaj malhelpoj, renkontataj de ĉiu privata revuo, precipe de unu Esperanto-revuo.

Unu granda malhelpo estas, ke la kompostistoj ne konas Esperanton. Tial pri mi mi diros, ke mi mem nun estas devigita ne nur diktadi dum la kompostado, sed eĉ iam propramane komposti, ĉar en Bulgarujo ne estas uzata la latina alfabeto kaj niaj kompostistoj eĉ malfacile legas Esperanton.

La sama cirkonstanco estas la kaŭzo, ke ni ne havas esperanto-presliterojn. La presisto ne konsentas havigi tiajn ĉi por si per sia kapitalo, ĉar li ne povas utili ilin en aliu preslaboro. Jen kial mi sola devas havigi por mi novan kompletaĵon da latinesperantaj presliteroj. Vi nepre havas vivsperton kaj konas kiom kara estas nun la vivado. Vi povas kompreni kia mal-

facilega estas la komencita de mi afero—la redaktado kaj eldonado de „Homeco“, precipe kiel povas fari tion ĉi per sia modesta salajro unu oficisto kiel mi. Oni sciu, ke en Bulgarujo la pastraro ne estas tiel bone pagata, kiel ie alie. Ĝi vivas nur per malgranda salajro, ĝi havas neniajn bienojn. Kaj Vi imagu pluen, ke mi devos havigi ankoraŭ pli etajn presliterojn, ĉar la nunaj estas sufiĉaj nek spece, nek kvante.

Estimataj gesamideanoj!

Nur mia forta amo al Esperanton igas min fari tian ĉi riskon. Ĉu ankaŭ Vi amas Esperanton? Mi tute ne dubas pri tio ĉi. Aliel Vi ne iĝus esperantisto. Mi tiel konkludas ankoraŭ, ĉar Vi ektenis la 1-an numeron de „Homeco“ Mi kredas, ke ankaŭ ĝia ideo plaĉis al Vi. Ĉar mi penas elporti ne kian ajn esperantlingvaĵon, sed ankaŭ seriozenhavan presaĵon. Aŭ, se Vi havas iajn aliajn konceptojn, ĉu Vi ne taksas mian penon pri Esperanto?

Jen kial Vi helpu al mi! Ne per alio—per grandaj sumoj, kiajn mi elspezis kaj elspezos; ne per grandaj klopodoj. Vi helpu al mi sole per la malgranda abonpago almenaŭ pri 5 n-oj (mi diras al la nepagintoj) kaj ekpenu varbi almenaŭ unu abononton.

Vi povas tre bone kompreni min.

Do tuj, senprokraste Vi iru en la poŝta stacio kaj sendu al mi tiun ĉi malgrandan, sed kolossignifan por nia afero sumon.

Vi plu ne atendu, ĉar Via abonpago estas la sola kondiĉo, mi daŭrigi la aperigadon de „Homeco“ kaj mi ne detruigu kurag- kaj materialflanke!

La redaktoro.

A L V O K O.

Bulgaraj gesamideanoj!

Pezajn tagojn travivas nia lando. La politikaj bataloj ĉe ni, havigante ĉiam pli akran kaj pli larĝan dimension dum la jaroj post la milito, donis la malgajajn, sed neeviteblajn rezultojn, kiujn oni devis antaŭvidi

Post la lastaj okazintaĵoj jam devas iĝi klare ankaŭ al la plej mallumigita saĝo, ke la bonfarton de l' popolo oni neniam atingos per intermanĝigoj kaj per ardigoj de l' pasioj, sed per edukado de l' popolamasoj en la spirito de la toleremo, la solidareco kaj la socia sento.

Sur ĉiuj kulturklerigaj organizaĵoj falas parto de la komuna tasko foreduki la popolon en tiu ĉi spirito. Ankaŭ nia Societo devas, kun kompleta konscio pri la signifo de sia agado, daŭrigi ankoraŭ pli obstine sian laboron.

Dum momentoj kiel la nuna oni vidigas, kiom konsciaj kaj seriozaj estis la batalantoj de unu idea kaj kultura movado. La hodiaŭa momento, kiu detiras la atenton de tuta popolo al aktualajn malbonaĵojn, estas momento ekzamena por la kulturklerigaj agantoj. Tia ĉi momento povas malfirmigi unu organizaĵon kaj neniigi ĉiujn akirojn, atingitaj dum jaroj per superfortaj klopodoj.

Vi pruvu hodiaŭ, ke vi ne estis hazardaj gastoj en la Esperanto-movado, sed ke vi kun profunda konscio albrustigis la Esperanto-movadon kaj laboris pri ĝi kiel seriozaj agantoj, kies laboron ne povas paralizati kaj senefikigi la uraganoj en la socia vivo.

Vi memoru, ke vi estas esperantistoj kaj pretiĝu subpreni kun ankoraŭ pli granda ardo vian kulturan kaj popolutilan agadon tuj, kiam la socia horizonto serenetiĝas kaj alpaŝas trankviliĝo en la lando.

Multaj uraganoj pasis, inter ili ankaŭ la longdaŭ-

ra mondmilito, sed ili ne povis entombigi Esperanton: ili pasis, Esperanto restis.

Oni travivos ankaŭ la hodiaŭajn malgajajn tempojn, venos tago, kiam ili estos forgesitaj. Sed kiel nun tiel ankaŭ tiam Esperanto vivados kaj florados, ĝi ne estos forgesita.

Vi estu indaj por ĝi. Vi ne perdu kuraĝon kaj ne opiniu, ke ĉiu agado pri kulturo kaj klerigo estas nebla.

Vi pretiĝu por la kongreso okazonta je la difinita dato! (19.—21. julio j. k. en Sofio).

Bulgara Esperantista Societo.

PRI NIA LINGVO.

En la redakcejo oni ricevis de unu samideano unu leteron, en kiu li skribas: „Kial Vi ne donas la manuskriptojn ankaŭ al aliu pli perfekta samideano, ke li korektu ilin antaŭ la presigo?“

La redakcio respondis al li:

„Bedaŭrinde, pli perfekta samideano tie ĉi ne ekzistas, kaj la montrataj de Vi „malkorektaĵoj“ estas konscie faritaj“

La afero estis tio ĉi, ke la redakcio provis apliki en la revuo unu sian komprenon pri pliklarigo kaj plimallongigo de nia lingvo.

Ni dezirus, ke oni pripensu:

1) Pri la vorta (logika) akcento en Esperanto. Koncerne tio ĉi la redakcio vidas en nia lingvo unu nediskutitan demandon. Ni pririgardu la jenan ekzemplon. Nia UEA havas unu konatan varbilon de membroj por si. La unuaj vortoj de tiu ĉi varbilo estas: „Ĉu Vi estas membro de UEA?“ Kiu povas esti la respondo de tiu ĉi demando? Jen kiu: „Mi“ Aŭ: „Ne mi; eble, aliu

Ni tiel opinias, ĉar evidente estas, ke tie ĉi oni atentigas sur la vorton Vi. (La lasta—hazarde pro la literformo—eĉ havas akcentan streketon). Oni scias, ke tie ĉi estas demandate, ĉu estas la demandato membro, tamen precipe ĉu plifortigas la vorton Vi. Sed ankaŭ sen ĉu, la vorto Vi estas pli forta, ĉar ĝi estas pli antaŭa. La pli antaŭa vorto en la frazo ĝenerale havas pli grandan forton, sur ĝi falas la vorta akcento de la frazo. Alie tio ĉi estas konsiderata en Esperanto. Ekzemplo: kiam oni ne atentigas precipe sur internacia, oni diras: „la lingvo internacia“, sed dirante „la internacia lingvo“, evidente estas, ke oni atentigas sur internacia.

Sed en Esperanto estas reguloj privilegiantaj iujn vortojn, ke ili estas metataj ĉiam pli antaŭe. Ili estas: 1) La demanda vorto ĉu estas metata ĉiam ĉe la komenco de la frazo. 2) La persono pronomo estas metata ĉiam antaŭ la verbo. 3) La poseda pronomo estas metata ĉiam antaŭ la substantivo.

Vere, tio ĉi donas al la lingvo severan regulecon, sed kion ni faros, se ni deziras akcentigi ne la diritajn privilegiantajn vortojn, sed tiujn post ili? Eble, oni diros, ke tie la afero evidentiĝos el la senco. Sed ne ĉiam la senco estas sufiĉe klara. Jen kial ni opinias, ke tie ĉi oni devus doni unu pli grandan liberon, permesante metadi la suprediritajn vortojn ne ĉiam pli antaŭe. Oni povu diri: „Ĉu estas Vi membro de UEA?“, por tiel evidente akcentiĝu estas, kaj ne Vi, kio estas la celo mem en la okazo. Oni povu diri ne nur „mia patro“, sed ankaŭ „patro mia“, kiel estas dirate ĉe la naturaj lingvoj. „Unde e ŝapka mea?“ (Kie estas ĉapo mia?), diras la rumanoj. Oni povu diri: „Iru ni labori!“ (kiel estas permesate en la poezio), por oni montru, ke estas akcentata la vorto iru, kaj ne ni.

Ni opinias, ke tio ĉi ne estas dekliniĝo de la Fundamento kaj ni danke aŭdus la honorindajn Lingva-

Komitatanojn, ĉu pravaj ni estas. Se ili ordonos, ke la lingvo restu netuŝata tiu-ĉi-rilate, ankaŭ ni obeos, kion ni vidigas en la prezentata n-o de nia revuo. Sed ni esprimas nian konvinkigon, ke la lingvo tiel estas ne komplete esprimova, ne komplete fleksebla, sed iel rigideta.

2) Pri la mallongigo de nia lingvo. Pri malmultigo de la silaboj, mi diras. En ĉiuj lingvoj estas tendenco por plej mallonga esprimo. Nome tio ĉi estas la kaŭzo de ĉiuj neregulecoj en la lingvoj. Ĉiuj neregulaj verboj konjugacie estas kreitaj de la buŝo nur por pli mallonga eldiro de la verbo. El la verbo *sitzen* la germano ne formas imperfekton *sitzte*, el du silaboj, sed *sass*, el unu silabo. En la malnovslava lingvo la 3 personoj kaj 2 nombroj de la verbo esti estas: *esam, esi, est; es-mi, este, sont*. Sed ĉe la bulgaroj, nunaj slavoj, la sama verbo hodiaŭ estas: *sam, `si, e; sme, ste, sa* (unusilabe). La samo estas en la deklinacio de la substantivoj kaj de la pronomoj. Tio ĉi kaŭzas la nekompletan eldiron de la frazoj, ankaŭ de la vortoj kaj ili estas apostrofataj.

Komparata per la naturaj lingvoj, precipe per la angla, franca, germana, ĉina kaj aliaj lingvoj, nia lingvo estas tro multesilaba. La ĉefa kaŭzo estas, ke la vortfarado ĉe nia lingvo fariĝas ĉiam per variaj finoj kaj afiksoj havantaj ĉiam almenaŭ unu silabon, dum tio ĉi en la naturaj lingvoj fariĝas iam sen afiksoj kaj variaj finoj, aŭ, se per tiaj, ili estas iam nur el konsonantoj, ne kiel en Esperanto nepre el silaboj (-o, -a, -as, -ant, -ad, -ec, -aĵ ktp.).

Sed ni devas pripensi tiun ĉi neoportunon, ĉar ja ni nun vivas dum la epoko de la rapidaj interkomunikigiloj: telegrafo, telefono, radiotelefono. Neniuokaze ni povas allasi, ke en la estonteco la homoj moviĝos kaj interkomunikiĝos pli malrapide. Ne, ni povas esti kredigitaj en la malo. Ni ne povas nun montri la regionojn, en kiuj estos aplikata la rapideco de la ho-

diaŭa radiotelefonio. Do ankaŭ la lingvo devas esti rapida interkomunikiĝilo. Eĉ nia lingvo, aperante kiel lingvo de la moderna kaj estonta homaro, devas esti pli mallongesprima ol ĉiuj ekzistintaj kaj modernaj lingvoj.

Kiel ni faru ĝin tia ĉi? Ĉu ni ŝanĝu ion el ĝiaj elementoj, kiel faris multaj novatoroj? En la estonteco, eble, ankaŭ tio ĉi estos trudita, sed nun ni ne faru ĝin. Ni gardu nian unuecon, kion oni ĝis nun tiel bone faradis. Sed ĉar aliflanke jam nun estas bezona mallongigo silabe, kaj ni ne dividiĝu de la Fundamento, bone estus por nun oni permesi almenaŭ:

a) Uzadon de la apostrofita artikolo (l') ankaŭ en la prozo kiel en la franca lingvo, almenaŭ kiam ĝi estas post prepozicio kun vokalo ĉe la fino. Ekz., de l', pri l' ktp.

b) Forlasadi la afikson **ec** dum vortfarado el adjektivoj. Ĉar kio estas la diferenco inter **beleco** kaj **belo**, **alteco** kaj **alto**? Vere, estas unu malgranda diferenco, sed la okazoj estas facile kompreneblaj sence.

Ni ripetas: ni provis apliki en la 1-a n-o de nia revuo tiujn ĉi, laŭ ni, bezonajn klarigojn kaj mallongigojn en la lingvo. Kaj kvankam oni riproĉis nin, ni ree asertas, ke ili estas nepre trudotaj de la tempo. Sed, aliflanke, ni ĉiris, ke ni devas gardi antaŭ ĉio nian unuecon. Ni havas Lingvan Komitaton. Ni danke aŭdus ĝian vorton.

H.

NI LABORUI

lv. Vazov.

Ni laboru! Tiuj ĉi glor-vortoj
 Sonu kiel ega sonoril',
 Estu ili eĥaj tra la kortoj
 Kaj al la dormanto la vekil'.

Ni laboru! Levu ni standardon
 Tiavortan kaj antaŭen do.

Al klopedo! Montras ni la gardon
 Kontraŭ la sklaveco, certan tro.

Ni laboru! De gepatroj niaj
 Daŭrigadu l' sanktan virton ni.

Ne timigu nin pen', ŝvit' iliaj,
 Ĉar al ili ĉion ŝuldas ni.

Ni laboru! For mallaboremo!

Ĝi adulto estas kun la viv'

Malamiko, neĉesanta premo

Kaj al la suferojn la dekliv'

Ni laboru! Ne estas armilo

Pli potenca, forta ol klopod';

Nur ĝi estas la mizerpelito,

Mondrampilo kaj de l' venko od'

Esperantigis H.

Grigorij Petrov.

HENRI FORD.

(Biografiaj notoj).

Eksterflanke la vivo de Henri Ford, kiel li mem priskribas ĝin, prezentas nenion precipe-ekskluzivan, romantikan, altiran. En la libro estas priskribitaj neni-aj amerikaj aventuroj. Estas nek streĉita lukto kont-

raŭ la embarasoj kaj malprosperoj, nek subitaj malriĉigejoj kaj bankrotoj, nek feeriaj riĉigejoj.

Tiurilate la vivo de Ford disvolvigis pacvoje.

Laŭ la vojo de la obstina, de tago al tago ĉiam streĉata klopodo. Sen febraj saltoj en la profitojn, sen ruzaranĝitaj spekulacioj, je kiuj estas plena la agado de aliaj amerikaj reĝoj de la nafto, de la tritiko, de la fervojoj. k. a.

*
* *

Henri Ford naskiĝis la 1863-an jaron en la sino de tiam ankoraŭ ne multe loĝataj amerikaj stepoj, en vilaĝa familio. Liaj gepatroj ne estis riĉaj, sed ankaŭ ne elmetitaj al senigoj. Ĉiuj laboris kaj ĉiuj estis sataj. Ili plilarĝigadis la sematan spacon kaj vivis per tio, kion ili eligadis per klopodo el la tero.

H. Ford, tamen, eĉ kiel malgranda knabo ne interesiĝis pri la terkulturo. La meĥaniko allogadis lin. Li kolektadis ĉiun najleton, ŝraŭbeton, ringon, radon, laderon, feron kaj laboradis al si el ili ludilojn. Kiam li estis 12-jara, al li okazis io difinanta la tutan pluan vivon kaj agadon de la estonta reĝo de la aŭtomobiloj.

Henri vojaĝis kun sia patro al la najbara urbo. Sur la vojo ili renkontis lokomobilon translokiĝantan de unu kampo sur alian, por ke eklaborigi vilaĝmastrajn maŝinojn. La peza maŝino malrapide moviĝis. La vaporo bruegis, fajfis. Ĝi timiĝis la ĉevalojn. Oni devis haltigi ĝin, por ke pasu la veturilo de Fordoj. Tiu ĉi maŝino estis la unua, kiun la malgranda Ford vidis moviĝantan senrele tra kamparoj kaj arbaroj memstare.

La malgranda Ford avide ĵetiĝis trarigardi la maŝinon-memmovigulon. La meĥanikisto volonte klarigis al li la konstruon de memmovigmaŝino. Tie ĉi oni decidis la sorton de Henri Ford.

La knabo Henri decidis eltrovi memmovigmaŝinon povontan moviĝi ĉien memstare, transportantan pezaĵojn kaj portontan homojn.

Hodiaŭtempe tiaj memmoviguloj—la aŭtomobiloj—estas ordinaraĵo.

Ili cirkulas sur ĉiuj randoj de la tero, kaj tiam, antaŭ kvindek jaroj, neniu allasis, ke estas eblaj maŝinoj-memmoviguloj.

La maljuna Ford rigardis la intencojn de sia filo kiel ĥimeran fantazion kaj opiniis, ke el lia knabo fariĝos nenio. Tute kun nenia volo li permesis al la dek-sesjara Henri, post kiam li finis la kurson de la vilaĝa lernejo, enpaŝi en la fabrikon de la najbara ŭrbo.

Henri Ford fariĝis lernanto pri forĝado kaj serurfarado. Poste majstro-mehanikisto. Kaj dum la tuta tempo li obstine pensadis, kion oni faru, ke la maŝin-memmovigulo estu pli malpeza. Ĉiun liberan tempon li uzadis por eksperimentoj. Ĉiun liberan monon li donadis por diversaj novaj modeloj.

La viditaj de H. Ford memmovigmaŝinoj estis tro pezaj, tromembrohavaj kaj negraciaj. Ili postulis por sia fariĝo multajn materialojn kaj forglutadis multan brulaĵon.

La revo de Ford estis:

1. Oni plifaciligi la pezaŭ klopodon de la homoj. Oni transĵeti la pezan flankon de la klopodo kaj de la movado de la dorso de la homaro sur la levilojn de la maŝino. 2. La maŝinon mem oni plimalpezigi, plimalkarigi, plifortikigi kaj plioportunigi—ĝenerale komunalaŝebligigi.

Vi rimarku la apartecon en la revo de la juna laboristo-seruristo. Ford revas ne pri gloro, ne pri potenco, ne pri riĉeco. Li revas simpligi kaj faciligi la malfacilan kaj la malsimplan konstruon de la movigmaŝino. Li revas faciligi la vojaĝon de la apartaj, unuopaj homoj. Plifaciligi la klopodon.

Henri Ford serĉas ĝojon kaj feliĉon en la plifaciligado de la klopodo de laŭeble pli granda kvanto da homoj sur la tero.

—Mi volas tiom simpligi la maŝinojn de miaj fabrikoj kaj tiom malkarigi ilin, parolas pli poste Ford, ke ĉiu vilaĝano kaj ĉiu homo de la klopodo povu aĉeti aŭtomobilon kaj li mem scipovu direktadi ĝin.

*
*
*

Celante revenigi sian filon sur la kampon kaj fortiri lin de la malamaj por la terkulturisto martelo kaj forĝejo, la patro Ford proponas al la juna meĥanikisto iom dekojn da dekaroj da plej bona arbaro de konstrumaterialo kondiĉe, ke Henri Ford aranĝos tie sian mastrejon.

Henri Ford ĝoje konsentis. Li enamiĝis kaj volis edziĝi, sed lia serurista salajro ne sufiĉis al du homoj.

La propono de lia patro estis bonveninta. Henri Ford vendis parton de sia arbaro por forhako. Li aranĝis lignosegejon kaj el la unua dehakita materialo konstruigis al si domon, kie enkondukis sian junan edzinon.

El ĉio estis videble, ke lia elekto estis trafa. Ford mem en sia konciza aŭtobiografio kelkfoje parolas pri sia edzino kaj ĉiufoje ame kaj danke. Komence li parolas:

—Mia trabaĵa domo estis modesta, sen rememoro pri pompo, sed mia juna kunulino scipovis ankaŭ inter la lignaj muroj krei ĝojan, nekompareble ĝojan, loĝadon.

Pluen Ford skribas, ke ankaŭ en la vilaĝo li ne forlasis siajn eksperimentojn pri la movanto de sia nova sistemo.

—Ĉiutage la vesperon, kaj sabate antaŭdimanĉe eĉ la tutan nokton, mi ne ellasadis, por ke laboreti mian maŝinon. Mi ne volas paroli pri tio, kiom peze estis al mi iufoje, kiom ĉagrenadis min la malprosper-

oj, sed mia edzino ĉiam kuraĝigadis min. Ŝi estis la
flugiloj de miaj esperoj.

* * *

(Daŭrigota)...

BONDEZIRO.

J. Bertucchi.

Je herboj plena ĉaro preterpasis
kaj ĝi post si parfumon plaĉan lasis.
Vi faru kiel ĝi, animo mia,
kaj de la tero, post foriro via,
de ĉiu bona homo en la koro
postvivu sopirata la memoro.

LA SENLIMO.

G. Leopardi.

Al mi ĉiame karaj estis jenaj
montet' kaj branĉa ĉirkaŭbaro solaj
al la rigard' da horizonto tiom
kovrantaj. Sed mi fikse rigardante
trans ili, jen senlimajn spacojn kaj
silentojn superhomajn, profundegan
kvieton revas, kie pro nemulto
timegas ne la koro. Kaj aŭdinte
de l' vento la murmuron interarban
mi ĝin komparas al silento tiu.
Kaj mi memoras pri la eterneco,
pri la estint' kaj pri la viva tempo

el kiu mi la voĉon aŭdas, kaj
 en tiu ĉi egaĵ' la penso mia
 dronanta jen, kaj dolĉe por mi estas
 en ocean' alloga droni tia!

La 2 versaĵoj—el la Itala lingvo.
 Esperantigis A. Mazzolini,
 L.-Komitatano.



Por komencantoj.

LA MALLABOREMA JUNEDZINO.

Bulgara popola fabelo.

En vilaĝo kreskis bela knabino Bogdanka. Ŝi estis tro mallaborema. Ŝiaj gepatroj estis bonhavaj. Ŝi estis ununura ĉe ili, tial—tro dorlotata. Ŝia patrino mastrumadis tra la hejmo, kaj ŝi nur ornamiĝadis.

Plenkreskis Bogdanka kaj fariĝis bela fraŭlino.

Oni komencis veni por postuli ŝin je bofilino. Ŝia patrino al ĉiuj diradis:

—Nia Bogdanka estas ankoraŭ malgranda kaj neinstruita labori. Ŝi estas mia dorlotatino.

Ĉiuj foriradis aŭdinte ĉi tion.

Foje venis maljunulo postuli ŝin.

—Mi aŭdis, ke vi havas belan fraŭlinon. Mi venis postuli ŝin je bofilino.

La patrino ankaŭ al li respondis:

—Nia Bogdanka estas ankoraŭ malgranda kaj neinstruita labori. Ŝi estas nia dorlotatino.

—Kvankam,—diris la maljunulo; ĉe ni neniu devigas iun labori. Kiu volas,—laboras, kiu ne volas,—

sidas senokupa. Mi havas ankoraŭ du bofilinojn. Kiam ili volas, tiam laboras.

Post semajno oni faris la geedzigon.

La duan tagon post la geedzigo la festeno finiĝis kaj ĉiu komencis sian laboron. La junedziĝo sidadis festvestite kaj nenion ekpalpis hejme.

Ĉiuj kolektiĝis tagmanĝi kaj sidiĝis ĉe la mangotablo. Nur la junedzino sidis for kaj atendis, por ke ili invitu ŝin. La aliaj bofilinoj alportis mangaĵon kaj metis antaŭ la bopatro grandan panbulon. Preninte la panon li disrompis ĝin je tiom pecoj, kiom homoj estis ĉe la mangotablo.

—Kaj al la junedzino? diris la bopatrino.

—Ŝi ne estas malsata,—reiris la maljunulo. Kiam oni ne laboras, ne ekmalsatas.

Post la tagmanĝo ĉiuj ree komencis labori. Ili laboris ĝis la vespero. La junedzino ree sidiĝis kaj nenion ekpalpis.

Ili kolektiĝis vespermanĝi.

La maljunulo prenis la panbulon kaj disrompis ĝin same je tiom pecoj, kiom homoj estis ĉe la mangotablo.

—Kaj al Bogdanka?—demandis la avino.

—Ŝi ne estas malsata,—respondis la maljunulo. Kiam oni ne laboras, ne ekmalsatas.

Vespermanĝinte ili iom interparolis pri tio, kiu kion laboros la venantan tagon, enlitiĝis kaj dolĉe ekdormis.

Enlitiĝis ankaŭ Bogdanka, sed ĉu povas ekdormi malsataj okuloj? Ŝi apenaŭ atendis ĝis la tagiĝo. Ŝi ellitiĝis, laviĝis, elmelkis la bovinojn, elirigis la bovidojn kaj purigis la hejmon.

Ellitiĝis ankaŭ la aliaj kaj vidinte kion estas farinta la junedzino, ekrigardis unu la alian kaj ekridetis.

Tagmeze la junedzino aranĝis la mangotablon kaj sidiĝis vice kun la aliaj.

Disrompinte la panbulon la maljunulo donis pecon al la junedzino kaj aldonis:

—Vi, junedzino, hodiaŭ laboris plej multe,—jen ankaŭ al Vi de la pano,—kaj metis antaŭ ŝi la plej grandan pecon.

Pasis ankoraŭ unu-du semajnoj kaj la junedzino kutimiĝis al la laborado.

Post tri semajnoj ŝiaj gepatroj venis gasti. Eliris ĉiuj sur la korto renkonte al ili, kaj la junedzino ekkuris, malfermis la pordegon kaj rapide ekkriis:

—Patrino!—Patro! . Bonvenon! Sed pli baldaŭ malsupreniĝu el la veturilo kaj ekkupiĝu je laboro! Tie ĉi oni ne estas kiel ni: tie ĉi oni ne permesas al nelaboranto manĝi!

El la bulgara lingvo. •
Esperantigis H.

A D I A Ŭ O.

T. Kunev.

(Laŭ popola maniero).

Abio flekse kliniĝas—
Adiaŭ diras fraŭlino.
Ŝi diras al la bofrato:
Bofrato, haltu, atendu,
Parolos mi al patrino:—
„Adiaŭ, restu, patrino,
Sen karesita naskaĵo!
Ĉu estos al mi do gaje
Ĉe la patrino de l' fraŭlo,—
Ĉu trovos mi, la orfino,
Dolĉegajn Viajn karesojn,
Kaj Viajn vortojn mielajn
Kaj la instruon patrinan?
Al Vi mi lasas, patrino,

En la ĝarden' la ocimon—
 Ho, kara estas al mi ĝi—
 Ĝin ne forgesu, patrino,
 Sed Vi surverŝu ĝin ofte—
 Per ros' vespere, matene,
 Per etaj larmoj tagmeze.
 Adiaŭ, restu Vi, panjo,
 Sen karesita naskaĵo!

El la bulgara lingvo. Esperantigis ritme H-

Al Bulgara Esperantisto kaj aliaj.

Homo iras tra la kamparo. Li scias la utilon de la arbaroj, sed vidas, ke la kamparo estas malriĉa je arboj. Tial vidinte arbeton li zorgeme ĉirkaŭtranĉas, eĉ ĉirkaŭbaras ĝin.—Por planto de arboj eĉ estas specialaj festoj en la kulturaj landoj.

Alia homo. Ankaŭ li iras tra la kamparo portante hakilon, sed li portas ĝin nur kun celo dehakadi. Ne pripensante, ĉu pluraj aŭ malmultaj estas la arboj sur la kamparo, li unusvinge kuŝigas ĉiun viditan arbeton.

En nin venas tiuj ĉi pensoj, kiam ni legas la recenzon pri nia revuo en B. E. (№ 10-1925.) kaj kelkajn personajn leterojn.

Ĉu Vi esperas, estimataj samideanoj, triumfigi Esperanton nur per la ekzistantaj esperantistaj gazetoj kaj revuoj, kiuj ankoraŭ estas nombrataj sur fingroj?

—La artikoloj de G. Petrov estas skribitaj de la aŭtoro speciale por la bulgara gazeto „Pastirsko delo“. Sed eĉ sen tio ĉi ni ne sentus nin kulpaj, ĉar unu el niaj ĉefaj taskoj estas moraliga, tial ni prenis tiacelajn verkojn de tie, kie ni trovus ilin.

Ni dankas al la samideanoj, kiuj amike montris niajn erarojn. Ni persiste daŭrigos klopodi kredante, ke ankaŭ ni servas al nia kara esperantismo.—La R.

La interna ideo de Esperanto estas ĝia esenco kaj ĝia vivo mem, tial ju ni pli klopodas pri ĝi, des pli ni proksimigas la triumfon de Esperanto. Sed tiu ideo estas identa kun **la homeco**, t. e. la spirita kaj la morala altiĝo de la homo.

La revuo

H O M E C O

konkrete esprimas tiun ideon.

Vi estu ĝia abonanto!

La 1-a numero de „Homeco“ estas elĉerpita.

